# *Twitter limigas atingon de kubaj amaskomunikiloj*



**Cenzuras Tvitero kubajn amaskomunikilojn.**

Havano,  okt 25 (RHK) La mikroblogada servo de Twitter, ekde lundo, markis kelkajn amaskomunikilojn sur la plej granda insulo de Antiloj kiel "ali?intaj al la Registaro de Kubo", decido kiu, praktike, limigas la amplekson kaj videblecon de la informoj dividitaj de koncernaj amaskomunikiloj en la socia reto.

La retejo Cubaperiodistas, de la Unio de Kubaj ?urnalistoj, denuncis la agon, kiu cenzuras kaj stigmatizas la publikajn amaskomunikilojn de la lando, decidon anoncitan de la platformo en a?gusto 2020.

Ekde la aplikado de la decido, Twitter ne rekomendos a? amplifos inter uzantoj la kontojn a? eldona?ojn de Cubadebate, Radio Rebelde, Radio Havano Kubo, Gramna, Trabajadores, Juventud Rebelde kaj Canal Caribe, inter aliaj.

Cubaperiodistas atentigas, ke la decido ne distingas publikajn amaskomunikilojn financitajn de sindikataj a? politikaj organizoj de publikaj ?tataj amaskomunikiloj.

Fonto: ACN

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/302878-twitter-limigas-atingon-de-kubaj-amaskomunikiloj

**Radio Habana Cuba**